

Pri la tempo de la Acera Siropo en Kanado

Legendoj diras, ke la Indianoj, la unuaj enloĝantoj en Kanado, jam malkovris la eblecon elfari bonegan sukeraĵon el la suko de la acero.

La Francoj kiuj venis poste, certe kun la arto de kuirmaniero en la sango, tre rapide alkuŝtimigis eltiri sukon el la aceroj ĉiun printempon por akiri la sukeran sukon, kiu fariĝas aromplena siropo, kiam ĝi estas preparita.

Estas sufiĉe malfacila laboro elfluigi la sukon el la arboj. Unue la farmisto devas kunpreni multe da tuboj, gutujsimilaj kaj purajn sitelojn el aluminio. Kaj li iras de arbo el arbo por fari tranĉvundon en la ŝelo de ĉiu. Li metas tubon en ĉiun truon kaj per la anso hokas sitelon sub la specialaj tuboj. Kiam la suko komencas elflui el la arbo, ĝi kuras laŭlonge de la tuboj, kaj falas en la sitelojn guto post guto.

Sur kelkajn tre dikajn arbojn, oni povas hoki ĝis kvar sitelojn sed sur la plej maldikajn nur unu.

En tiu lando estas tre kutima spektaklo dum Marto vidi tiajn arbojn kun hokitaj siteioj.


Kiam la siropo estas farita (daŭras longan tempon, multaj horoj da boilado necesas por havi

tian rezulton), kaj antaŭ ol meti ĝin en ujojn, la farmfamilio festas la ĝojan okazaĵon kaj invitas geamikojn kaj gekonatulojn veni en la kabanon. La dommastrino kuiras fazeolojn kaj metas ilin en korbbon kun freŝaj bulkoj, teleroj, forkoj, tranĉiloj, kuleroj, varma kafo kaj lakto. Kaj ŝi jungas la ĉevalon al glitveturilo; poste kun laŭtaj ĝojkrioj, la infanoj surgrimpas ĝin kaj kovras sin per lantukoj; la grandegan piknikkorbon ili mem tenas, kaj la dommastrino supreniras. Kaj ili foriras tre rapide al la kabano kie la gastoj jam atendas aŭ alvenos post momento. Por komenci, ili manĝas la fazeolojn kaj poste estas la solena momento, kiam la unua sukera, sukkena siropo estas verŝata en la grandan terpoton por la geamikoj. Ĉiu gasto tenas bulkon kaj tasegon da varma siropo, kaj iras al la kabano en la sunlumon por fari « la tire ».

« La tire », kiu estas bonega dolĉaĵo ĉe la Kanadanoj estas farita tiamaniere: ili verŝas la varman siropon sur la malvarman neĝon. Kiam ĝi fluas, la siropo malmoliĝas kaj farigas mirinda sukeraĵo. Oni manĝas ĝin kun varma bulko kaj butero kaj kia granda festo estas!

En la arbaro resonas la ridoj kaj laŭtaj paroloj, kiam la familio kaj amikoj gustumas. Ĉiuj estas gajaj, precipe la farmisto, kiu gustumas sian siropon kaj kiun ĉiuj komplimentas pri lia laboro.

Joselyne BERTHELOT.



VIZITU PARIZON

ALIGANTE AL LA INTERNACIAJ KULTURAJ kaj TURISMAJ FERIOJ vi povos ankaŭ viziti la francan ĉefurbon.

Petu informojn:

E.K.D. Grésillon, 49-Baugé